Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo vendredon la 11an de novembro 2011, per Skype.

(Aprobita la 8an de decembro 2011.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os (alvenis dum punkto 2)
Ingebjørg Rambjør en Bergen
Mario Machlik en Tromsø
Eli Fitjar en Bergen
Judith Parelie Abrahamsen (ĉeestis dum punkto 2)

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 20-an de oktobro 2011

La protokolo estis aprobita.

2. Ontaj retpaĝoj

Judith Parelie Abrahamsen prezentis proponon pri novaj retpaĝoj.
- Unue la estraro esprimis dankon al Judith pro ŝia laboro pri la afero.
- Grava avantaĝo per la nova propono estas ke oni povas administri la paĝojn de diversaj lokoj, ne nur de la laborejo de Judith.
- Diskuto kielmaniere prezenti la paĝojn (celgrupo): ĉu por esperantistoj, por esperantoparolantoj aŭ al interesitaj ne-esperantistoj?
- Ankaŭ diskuto pri kiel prezenti la paĝojn lingve, esperantlingve, norveglingve aŭ en ambaŭ lingvoj. Ni interkonsentis ke pli bone ambaŭlingve. Tielmaniere oni povas prezenti la lingvon por ne-esperantistoj.

3. Landa responsulo pri informado

Brian Barker (UEA) demandas, ĉu NEL havas responsulon pri informado al radio kaj televido. Evidente temas pri internacia kampanjo igi amaskomunikilojn raporti pri Esperanto okaze de la jubileo en 2012. Li volas sendi materialon/ideojn al tiu kontaktpersono. Ĝis nun ni ne havis responsulon. Sed post diskuto Mario Machlik volontulas esti tia kontaktulo, li skribos al Brian Barker ke NEL ne havas multajn homfortojn, sed ke ĉiuj bonaj ideoj estas bonvenaj.

4. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–20:41. La venonta interkonsiliĝo okazos la 8an de decembro.
Raportis Ingebjørg Rambjør.